

La Karavelo

En Oktobro 2007, per la unua numero aperinta revuo LA KARAVELO – prilaboranta la portugalan literaturon – elektis sian nomon kaj ankaŭ simbolon la KARAVELO.

La Karavelo estis ŝipo de Hispanoj kaj Portugaloj dum la 15-16-aj jarcentoj. Kutime oni konstruis ĝin per tri krucvelaraj mastoj, alta pruo kaj per bastona pobo, por sekura vojaĝo tra multmaroj al novaj mondoj. Ankaŭ tiuj estis la ŝipoj de Kristoforo Kolumbo.

Sur la supra ekirpaĝo de la revuo plaĉemas la figuro de Karavelo sur la blua maro. Kiel bonkonstruita estis tiu ŝiptipo, same bona estas ankaŭ la strukturo: la lokigo de la diversaj tekstoj, ĝia perbilda ornamigo, elekto de la kunlaboranta verkantaro.

Pri la portugala literaturo, pri ties elstaraj reprezentantoj mi legis jam plurfoje, tamen miaj konoj estas tre mankhavaj. Por esti leganto de ĉi revuo, por mi estas honorigo kaj grava promeso, al pli bona ekkono de literaturo de la pasinto kaj nun, kaj pere de esperantistoj. Mi certas, ke ĉi okazo donos al mi eksterordinarajn travivaĵojn; sur ĉi tiu ŝipo. El la portugala literaturo min interesis ĉiam, sed ankaŭ nun la legendoj de sanktuloj, la kavalirhistorioj, la poemoj verkitaj laŭ popolkantoj aŭ simile al ili, la realistaj verkoj de la Lernejo de Coi'mbra, plie verkoj de Fernando Perreira. Mi esperas, ni povos renkonti ankaŭ ilin.

Mi akceptas bona ideo – la aperigon de la vivovojoj de aŭtoroj de la prezentitaj verkoj kaj de tradukantoj.

Mi sentas la forreston de la kariero kaj foto de la greka sinjoro Spiros Sarafin – sed certe mi trovos ilin en iu en la venontaj numeroj. Li estis tradukisto de verkoj de Platono kaj la verko HISTORIO de Herodoto.

Mi elkore salutas ĉiun kreanton el inter la surŝipe veturantoj, kiuj prezentas ankaŭ el la propra verkaro por ni legantoj.

Mi pensas bona ideo la aperigon de la tradukitaj verkoj el la diversepokaj portugalaj literaturaĵoj en la sama revuo, kaj ne aperigi ilin en laŭdata vicordo de la verkistvivdaŭro aŭ de la kreiĝo de la verko.

Tielmaniere la revuo pli koloras.

Servas mian apartan kontentecon, ke al la de mi konata aŭtobiografio (verkita unue de João Gaspar Simões) pri Fernando Pessoa (Fernando Pessoa), kiome similas al tiu, verkita de s-ro João José Santes. Tre bona sintezo estas!

En la tradukitaj poemoj bone konsonancas kaj la internaj kaj la eksteraj rimoj.

La prezentitaj poemoj kaj prozoj harmonie sekvas unu la alian, tiel difinas ne nur la logikon de la dirindaĵoj, sed ankaŭ la bonhumoron de la revuo.

Ĉiujn-ĉi resumante mi pridiras: la unuaj du numeroj de la revuo La Karavelo, plaĉas al mi.

Kaj, ĉar pri LA KARAVELO la ekiriganto-aŭtoro Johano Santos metis antaŭ min: ĉiam primetitan-tablon, el la per si mem portitaj aĵoj-literaturaĵoj mi scivoleme atendas la sekvan produktaĵprezenton.

Adrienne, s-rino Pásztor